



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JULIO - AŬGUSTO

1964

4

KULTURAJ KAJEROJ

1964

Julio - Aŭgusto

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna presaĵo.

EN H A V O

La Ciklo de la Krabo :

P. Babin.

Mirinda loko :

Sankta Mikaelo Monto (2) (B. Cheverry).

Edukado kaj paco :

Maria Montessori.

Historio de eta lando :

Monako-Montekarlo - E. grupo en Monako.

El ie en la mondo :

Fantaziaĵoj el Londono (S-ro Fowler).

Okcidento-Oriento

Aspektoj de Hindujo.

Teatraĵeto :

S-ro Grabowski kaj baronino (H. Chavan).

Kelkaj gravaj datrevenoj.

Por via distro :

Nia konkurso (P. Chevalier).

Gramatiko per bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

La Ciklo de la Krabo

Josue de Castro, la prezidanto de la Monda Asocio kontraŭ la Malsato, rakontis en noveleto, kiun li verkis kiam li estis juna, ke en lia lando, Brazilo, ekzistas homoj kiuj vivas sur bordo de rivero en kabanaĵoj faritaj el pajlo kaj koto kaj kovritaj per ondolado. Ili vivtenas sin per la kraboj, kaj la kraboj vivtenas sin per la homoj. Ĉio homa en tiu parto de la lando estas, estis, aŭ estos krabo. Pro tio la aŭtoro konsciiĝis pri malsato kaj subevoluinteco kaj studis la problemon. Kiel medicinisto li faris klinikan tabelon de la malsano, Malsato. Li montris ke tiu aŭ tiu ĉi popolo ne malsatas pro malleboremo sed inverse, ke ĝi estas mallaborema pro malsato. Por pli profundigi sian esploron, Josue de Castro studis antropologion kaj la homan geografion. Li montris, ke estas malvere diri, ke la klimato malhelpas la evoluon de la popoloj, ĉar multaj altnivelaj civilizacioj naskiĝis en subtropikaj regionoj. Li montris, ke ne nur senmiksaj rasoj estas laboremaj ĉar, kiuj popoloj povas aŭti, ke ili ne estas la rezulto de la miksado de diversrasaj invadintoj?

Kio estas malsato? Tra la jarcentoj, fakte ĝis antaŭ kelkaj jaroj, ĝi restis « la deziro al manĝo ». Ĝi estis konsiderata fakto natura. La malsatantoj ne konsciis pri la kialo de tiu malsato. Ili plej ofte atendis kaj preĝis. Ankoraŭ nuntempe multaj el ili atendas, ke Dio nutros ilin. Gandhi sidis en la dezerto kaj preĝis. Sed Nehru preferis, ke oni irigaci la dezerton, « ĉar », li diris, « estas freneze paroli pri Dio, kiam la homoj malsatas kaj mortas ».


La granda malkovro de kelkaj nuntempaj sciencistoj estas la difino de la kaŭzoj de malsato, kaj la esploro de la rimedoj, de la « kuraciloj » por lukti kontraŭ tiu malsano. Despli

grava estas tiu laboro, ke malsato estas unu el la kaŭzoj de milito. Niaj papatrioj fabrikis la unuajn armilojn por ĉasi, por sin nutri. Tiu-tempa ĉasado estis deviga laboro. Ĝi nuntempe fariĝis nur sporto. Kiam la homoj kultivis la grundon ili uzis la ĉas-armilojn por defendi siajn kampojn aŭ preni la rikoltojn de aliaj. La milito estis necesa. Sed malsato kaj milito estas nur transiraj solvoj kiujn oni povas elimini, pro tio ke ili ne estas parto el la homa strukturo.

Kiuj estas la rimedoj por elimini malsaton? Ĉu oni ne diras ke la homoj estas tro multaj sur la tero? Tio ne estas vera, ĉar nur dek procentoj de la grundo estas kultivitaj, kaj kelkfoje malbone kultivitaj. Tri homoj en dezerto, tio estas trologado. Tri mil homoj en dezerto irigaciita, tio povas esti sublogado. Oni diras ke granda parto el la monda grundo estas tro seka, aŭ tro tralasiva. Sed la nunaj konoj obligas la fekundigon de nefekundaj grundoj. Tion oni faris en Izraelo, en Kalifornio kaj en Centra Azio. Sed estas necese ne malekvilibrigi la elvolvigon de popolo per aplikado de nur partaj solvoj. Kiam oni enkondukas en landon la porinfanan kuracadon, estas necese ankaŭ pensi, ke oni devos nutri la infanojn tiamaniere savitajn. Se lando akcelas sian industriigon, ĝi ne devas malatenti la plifortigon de sia terkulturado: se ne, baldaŭ venos revolucio.

Tiaj estas la ĉefaj ideoj de Josue de Castro. Li deziras ke la homo sin forsavu el « la ciklo de la krabo ». Tio estas ebla se ni konscios ke ĉiuj krudaj materialoj estas anstataŭigeblaj sintezeblaj, transmutacieblaj. Nur la homa imagopovo estas neanstataŭigebla natura rikofonto.

P. BABIN.



Se vi deziras ricevi le venontan numeron de

Kulturaj Kajeroj

restas al vi malmulta tempo por pagi vian abonon

Sendu ĝin al : Micard, Kulturaj Kajeroj

Epineux-le-Séguin (Mayenne)

P&C : Nantes 2349-62

aŭ al la peranto en via lando

(Listo sur la lasta kovril-paĝo).

MIRINDA LOKO


Sankta Mikaelo Monto (Daŭrigo)

Anstataŭ rampi sur la strato kaj sur la pitoreskaj ŝtupoj, oni povas supreniri al la abatejo per la kornico de la remparoj : patrola vojo starigita inter la urbo kaj la marsabloj, kiu laŭiras la supron de la muro ĝis poterno nomita Truo de la Kato. Tie komenciĝas la suprenirejo al la abatejo. La patrola vojo fariĝas grandioza sinsekvo de ŝtupoj, kiuj malvolvigas laŭ malrektaj linioj, super la marsabloj, ĉiam sin apogante sur la krono de la embrazuroj de la remparoj — tiuj remparoj kun linioj tiel imponaj, kun koloroj tiel belektaj de la ŝtonoj patinitaj de la tempo kaj vetero.

Antaŭgardata de la barbakano, kiu estas ĝia antaŭa posteno, la kasteleto estas belega fortikaĵo konstruita ĉe la komenco de la 15a.j. kaj kiu formas de tiu epoko la solan enirejon al la abatejo. La abatejaj loĝejoj, severaj kaj nudaj, boritaj de maloftaj fenestroj, enhavis, krom la loĝejon de la abato, la loĝejojn de la monaĥoj, la malsanulejon, la kapelon kaj aliaj ĉambregoj por la oficiroj kaj la gastoj. Bela fortikigita ponto (1.450) kun trilobaj maŝikulioj, kaj pli supre ligna ponteto restarigita, transpasas gracie la koridoron de la ŝtuparo, kuniganta tiujn konstruaĵojn kun la preĝejo, centra konstruaĵo, kiu superas la tutan abatejon. Ni eniru. La preĝejo senkultigita prezentiĝas en sia tuta majesta nudeco, kun la impresa kontrasto de du epokoj, kaj du stiloj. La romanika stilo, severa kaj impona harmoniigas admirinde kun la ruĝaj kaj la verdigantaj nuancoj, kiujn ricevis la malnovaj ŝtonoj kovritaj de rustaĵo kaj musko. Ĉar la ĥorejo de la romanika konstruaĵo defalis en 1421, Guillaume d'Estouville komencis en 1450a. la nunan ĥorejon kaj, tiele, al bona malfeliĉaĵo, ni ŝuldas unu el la ĉefverkoj la plej perfekta de la gotika flaviganta arto, en la tuta suprenirejo, la maldikeco kaj alteco de ĝiaj linioj, en la tuta abundeco kaj delikateco de la ornamaĵoj. Estas preskaŭ nekredeble, ke la malmola granito tiel moligis por esti eltirita, ĉizita, traborita, kun tia delikata ler-

teco ! Elirante el la fortikaj romanstilaj konstruaĵoj oni admiras pli senteme ankoraŭ l'eksteran aspekton kun la piramida amfiteatro de ĝiaj radiantaj kapeloj, de la duoblaj apogarkajoj kaj de ilia pinakloj. Inter tiu neordinara ŝton-florado, estas eljetita la aera, kapturniga « punta ŝtuparo » supreniranta sur la maldika fadeno de apogarkajo ĝis la supera galerio de la granda kupolo. De tie, al vizitanto staranta je 120 m. super la marsabloj, ŝajnas reale, ke li flirtas birdfluge super la ŝtonego, la urbo, la abatejo kaj la tuta golfeto desegniĝanta kvaŭ sur karto, kaj ke li fratiĝas kun la ormita aperajo de St. Mikaelo de Frennet starigita tamen 40 m. ankoraŭ pli alte sur la maldika pintotureto moderna de la centra turo, kun fulmigan-ta glavo, kiu elvenkis la demonon.

El la eteraj regionoj, ni rapide malsupreniru en la subterajn regionojn. Ni volas diri en la vastajn fundamentajn konstruaĵojn, kiuj ĉirkaŭas la pinton de la ŝtonego kaj subtenas la preĝejon. Unue ni admiras sub la ĥorejo, la fortikecon kaj elegantecon de la krypto de la « Dikaj Pilieroj », kie la nervaĵoj de l'arkajoj kunmiksiĝas, per tiom da arto sur la dikegaj kolonegoj, kie la du centraj pilieroj, precipe, dividiĝas, kiel gigantaj palmarboj. Ni ankoraŭ pli



malsupreniri : jen estas la kriptoj de Akilono, poste la karuĝoj de la monaĥoj, en kiun la mortintaj religiuloj estis malsuprenigitaj rekte de la preĝejo kaj entombigitaj en kaŭstika kalko, la kapelo de la « tridek kandeloj » okupata hodiaŭ per la grandega rado, en kies kavajo la malliberuloj turnis, kiel sciuloj, por suprenlevi la ŝarĝojn, kaj ankoraŭ pli profunde la teruraj karceroj, iamaj tomboj por vivantuloj.

Spiro ni reakiras elirante el tiuj premegantaj mallumaĵoj. Ni konatiĝas kun la ĉefa monumento, kiu centfoje meritis sian nomon : la Mirindaĵo ! Interne ĝi konsistas el du konstruaĵoj apudaj, dividataj ĉiu en tri etaĝoj : la okcidenta konstruaĵo konsistas el la Provizejo, la Cambrego de la kavaliroj kaj la Kovrita Promenejo ; la orienta konstruaĵo surmetas same sur l'Almozejon, la Cambregon de la Gastoj kaj la Manĝejon. Aparte vidinda estas la Cambrego de la Kavaliroj, kun ĝiaj kvar belaj navoj hele lumigitaj kaj tiel perfekte harmoniaj : la cilindraj kolonegoj el bela verdirigita granito kroniĝas per kapitejoj riĉe skulptitaj je floroj kaj foliaĵoj, kiuj ricevas la refalantan faskon de la arkaj-nervajoj. La Manĝejo estas unupeco navo, vastega, rektangula, ĉambrego kovrita per granda ligna laŭbo, kiu volviĝas sub la tegmento. Ankaŭ, ĝi estis dormejo dum la 17a.

jarcento. Tiu ĉambrego estas admirinde prilumita : ĝi ricevas lumon el ambaŭ flankoj per daŭra vico de ege mallarĝaj fenestroj, lancetformaj, kiujn, interne, enkadrigas kolonaro de ĉarmaj arkadoj. Okcidente, tiu manĝejo malfermiĝas samnivele al la Klostro, la plej delikata juvelo de la Monto Sankta-Mikael, kaj la Mirindaĵo de la Mirindaĵoj. Kiajn perspektivojn belegajn kaj neatenditajn formas inter si, tiuj kvar galerioj, tiel delikate floritaj sub sia malpeza ligna laŭbo, simila karenon de barko renversita ! Ili sinsekvas inter muro tapetita per arkadoj kaj duobla kolonaro, kies delikataj ogivoj refalas sur maldikajn kolonetojn, lozange starigitajn. La maldikaj trunketoj estas el ruĝa granitelo ; sed — pro nura escepto sur la granita monto — la arkadoj konsistas el delikata blanka kalk-ŝtono pli facile ĉizebla por la skulptisto, kiu gravuris per nekomparebla majstrecio, la timpanojn, kaj la frisojn : floroj kaj foliaĵoj tute elstaras el la ŝtono, kaj aero ilin trapasas. Kaj sur la tuto, moderna tegmento ĵetas la zigzagan helon de siaj tegolaranĝoj el emajlaj skvamoj ruĝaj kaj nigraj.

Antaŭ ol malsupreniri, kaj eliri el la Monto, ni rigardu al la tuta ĉirkaŭaĵo : admirinda ĝenerala vidaĵo super la golfeto ! « Tombelaine » ekaperas, 2.500 m. malproksima. Ĝi estas nur granita insuleto, nekulturita kaj sovaĝa, sed ĝia historio estas intime kunligita kun tiu de la Monto. Ĝi ludis militan rolon dum la Centjara Milito, kiam Angloj uzis ĝin, kiel apogloko, krom tio, ĝi estis de la 10a. ĝis la 17a. jarcentoj, religia anekso de l'abatejo. Tiam ĝi posedis kapelon kaj monakejon sub la kurioza alvoko de « Nia Sinjorino Kuŝanta ».

B. CHEVERRY.



Edukado kaj paco

MARIA MONTESSORI

« Same kiel estis necese havigi al la homo novan korpan konstitucion por kontraŭbatali la peston, tiel estos necese havigi al li novan spiritan konstitucion por kontraŭbatali la militon ». Tiujn vortojn diris Maria Montessori, kiu kreis lernejojn en multaj landoj, en kiuj ŝi celis al edukado, kiu ne kondukis la individuon al izoleco kaj al la kulto de propra profito.

Maria Montessori interesiĝis pri infanoj, komence de la nuna jarcento, kiam ŝi estis helpantino en psikiatra kliniko en Romo, kaj devis studi la kondutadon de grupo de junaj intelekt-malfortuloj. Ŝi jam antaŭe ricevis precizan sciencan orientadon de la antropologio Giuseppe Sergi, kaj de Cesare Lombroso, profesoro pri kriminala antropologio. Post sia studado ŝi komencis proprajn esplorojn kaj okaze de restado en Francujo ŝi multe interesiĝis pri la studoj de Itard, kirurgo, kiu dum la unua triono de la lasta jarcento sukcesis eduki surdulojn. Ŝi poste konstruis sian « materialon » t.e. serion de objektoj oportunaj por subtiligi la difektajn sensojn.

Samtempe sin prezentis al ŝi la demando : « Car post multaj sciencaj esploroj kaj studado de konvenaj pedagogiaj metodoj oni sukcesas plibonigi la sorton de eksternormuloj kiujn rezultojn oni atingus sammetode zorgante pri la normuloj ? ». Por atingi valorajn rezultojn estis necese meti la infanojn en etoson konvenan, en kiu ilia personeco povus tute sincere kaj spontane manifestiĝi. Kiam en 1905 estis konstruitaj en Romo vastegaj popularaj loĝejoj kun « Infanaj Domoj », Maria Montessori estis komisiita por organizi kaj estri tiujn domojn. La infanoj tie trovis la « Montessori-edukmaterialon » kaj edukistojn kiuj kvankam pririgardante ilin konstante lasis ilin liberaj sekvi siajn proprajn impulsojn. Per tiu metodo « nova » infano manifestiĝis : atentema, kvietita, ĝentila, pacema. Ĉu tiu

pacema infano montris al Maria Montessori, ke ankau la mondo povus esti pacema ? Ĉu ŝi deziris ke la mondo estu pacema kaj serĉis la metodojn kaj la etoson konvenajn por krei paceman homon ? Ni ne scias. Sed de tiu tempo ĉiuj ŝiaj esploroj celis al kredo de tiu « pli bona homo ». Si notis : « La nekontentigitaj postuloj de la infano postlasas ĉe la adoltulo la stampon de konflikto, de senĉesa batalo, kiu atendas la homon ĉe sia naskiĝo kaj akompanas lin dum lia tuta elvolviĝo : konflikto inter la adoltulo kaj la infano, inter la fortulo kaj la malfortulo, ni povus eĉ diri inter la vidanto kaj la blindulo. La adoltulo triumfas kaj pro tio kiam li fariĝos plenkreskulo la individuo konservas en si la stampon de ĉiu « konflikto », t.e. de detruado unuflanke kaj de doloriga adaptiĝo aliflanke. « La obeemo, kiun ni postulas de la infano, hejme kaj en la lernejo ne akompanita de iu intima persvado, preparas la homon al disciplinema kurbigo antaŭ obskuraj fortoj. La publikaĵaj riproĉoj naskas absurdan antaŭtimon de la publika opinio. Dum la procezo de adaptiĝo al tiuj situacioj, kiu kreas konstantan komplekson de malsupereco, naskiĝas kaj disvolviĝas spirito de pieco kaj idolkulto favore al la « estroj » ; kiuj anstataŭas la patrojn kaj instruistojn, personojn kiuj imponis la infanon, kiel perfektaj kaj nearemaj. Tiamaniere la disciplino preskaŭ fariĝas fenomeno de sklaveco.

Kio originala estas en la penso de Maria Montessori ? Si nur supozas ke la infano estas fundamente bona sed estas malbonigita de la socio, kiel J.-J. Rousseau pensis. Sed la granda diferenco estas, ke Rousseau nur obeis poetan intuicion kaj Maria Montessori sekvis la konkludojn de atenta, ekzakta scienca studado de ĉiuj infanaj manifestiĝoj.

Laŭ artikolo de Maria REMIDDI
aperinta en Unesco-Kuriero.

LA VIVO EN GRÉSILLON

AGRABLA RESTADO

« Saluton, sinjoro ». — « Ho ! Jen la unuaj esperantistoj depost nia foriro el Hamburgo ! ». Tiu konversacio okazis en la rebuso survoje al Bauge inter kelkaj partoprenantoj de la unua somera restado.

De la 2-a ĝis la 19-a de Julio, dank'al la interesaj prelegoj de Gesinoroj Roose el Brugge, Doktoro Boulogne el Aix en Provence, Sinjorino Cherverry el Angers, Sinjorino Roux el Saumur kaj Sinjoro Vidal el Clermont-Ferrand, ĉiuj gastoj povis laŭplaĉe pliriĉigi sian scion pri historio, literaturo, medicino kaj abelbredado aŭ lerni kiel resti juna.

Dank'al la bela vetero, kiu ne avaris la julia Ĉielo, la naĝantoj svarmis preskaŭ ĉiutage en la agrabla, freŝa banejo. Oni pilk-kaj vort-ludis, oni konversaciis sub la granda kverko tre serioze pri la temo de la matena prelego. Post la vesperaj filmoj aŭ ludoj, daŭris ankoraŭ longe la ŝerplenaj konversacioj inter la novaĵ aŭ malnovaĵ amikoj.

Kelkaj venis al Grésillon la unuan fojon, sed ili jam pensas pri la reveno. Ĉu tio ne estas pruvo, ke la restado plene sukcesis ? Ĝis revido Grésillon !


Sinjorino VINCENT.



HISTORIO DE LA ETA LANDO...

Monako - Montekarlo

(Daŭrigo)



Sed oni ne povas paroli pri la Princlando ne menciante ĝian faman kazonon de Montekarlo, kiu estis fondita antaŭ preskaŭ cent jaroj sur plataĵo nomita « des Spélugues ». Tiam tiu plataĵo estis tute kovrita de oliv-kaj oranĝarboj, kiuj baldaŭ devis esti anstataŭigitaj per luksa urbo, rendevuejo de la tutmonda mondmularo.

Tiu kazino daŭre restas la altira centro de multnombra klientaro, kiu vespere retroviĝas, laŭ la sezonoj, ĉe la « International Sporting Club » aŭ ĉe la « Somera Sporting », unuarangaj ejoj kiuj estas famaj pro siaj luksegaj festoj.

Estas en la salonego Garnier, kiu troviĝas en la Kazino, ke enmondigis la famaj rusaj baletoj de Diaghilew, kaj kie, ankoraŭ nuntempe, oni povas ĝui grandiozajn baletojn, prezentaĵojn de la plej famaj internaciaj ensembloj, operojn, koncertojn, komediojn, ktp.

La marajn sportojn oni praktikas sur la monakaj plaĝoj ĉefe ĉe la « Monte-Carlo

Beach », kiu kun siaj hoteloj, sia restoracio, sia olimpia naĝejo, siaj bungalow konstruitaj en la verda naturo, konstituas perfektan tuton.

La baneja ekipaĵo de la Princlando plibonigis ankoraŭ lasttempe dank'al la konstruado de la Naĝeja Stadiono Rainier la IIIa. Tiu stadiono, kiu havas olimpiajn dimensiojn estis inaŭgurita antaŭ du jaroj. Plue estis konstruitaj du aliaj naĝejoj situantaj en la centro de Montekarlo : unu ĉe la Hôtel de Paris, kun finlandaj saŭnoj, kaj dua ĉe la Hôtel Métropole. Tiuj du lastaj estas uzeblaj dum la tuta jaro.

Cetere, ĉiuj sportoj estas honorataj en la Princlando, lando de la « Aŭtokuro en la Urbo » aŭ « Grand Prix de Monaco » kaj de la « Rallye de Monte-Carlo » la tre grava vintro-turisma aŭtokonkurado. Teniso, golfado, rajdado... ĉiuj povas praktiki ĉi tie sian plej ŝatatan sporton.

Konkerne la promenadojn al la ĉirkaŭaj regionoj, ili estas multnombraj kaj diversspecaj. Tiuj kiuj ŝatas montgrimpadon preferas sin di-

rekti al « La Turbie », al la « Hundo-kapo » aŭ al « Mont Agel », al Peille aŭ al Gorbio, laŭ belaj vojoj, sovaĝaj padoj, montvojetoj kiuj ĉe ĉiu turniĝo permesas ekvidi lumajn perspektivojn.

Aliaj preferas sekvi la marbordon. Al ĉi tiuj sin proponas la belaj ekskursoj al « Cap Martin » aŭ al « Cap-Ferrat ».

Por la longaj ekskursoj, la malantaŭa regiono estas same alloga somere kaj vintre. En tiu lasta sezono, belaj skikampoj bonege ekipitaj ĉe la najbaraj stacioj, permesas sin dediĉi al la plezuroj de skiado kaj trovi je la reiro la printempan ĉarmon de la Lazura Marbodo.

Tiel, la Princlando Monako proponas al ĉiuj siaj vizitantoj, en ĉiu sezono, hormonian tuton de belo kaj agrablo.

Sed ĝi estas ankaŭ kultura centro.

La « Société de Conférences de Monaco », sub la alta protektado de S.A.S. la Suverena Princo, prezentas ĉiun vintron tre larĝe varian programon de paroladoj, prelegoj, muzikaj kunvenoj, projektado de turismaj filmoj, publikaj debatoj rezervitaj al la ĝejnuloj.

Finon de 1950a jaro, S.A.S. la Princo Rainier IIIa kreis la Belettran Konsilion de la Princlando, al kiu li konsentis sian altan protektdon. Tiu ĉi konsilio funkcias sub la prezidanteco de Princo Pierre de Monako, patro de la suverena Princo.

Liaj opinioj helpas la Suverenan Princon atribui la premion de Princo Rainier IIIa, valorantan unu milionon de malnovaj frankoj, ĉiujare, al franclingva verkisto por lia tuta verkaro.

En 1960, S.A.S. la Suverena Princo fondis, en sama spirito, premion por muzika komponado.

Ekde kelkaj jaroj, S.A.S. permesis, ĉiu somere, ke la Honora Korto de lia palaco estu transformita en alta loko de la muzikarto. La nacia orkestro de la operejo de Montekarlo donas brilajn koncertojn, sub la direktado de prestiĝaj majstroj kaj kun la kunlaboro de la plej muzikamantoj.

Religio, la Princlando Monako estas katolika kaj ĉiujare, la 17a de januaro, ĝi fervore solenas la feston de Sankta Devota, sia patronino.

Monako konas alian tre kortuŝan procesion : tiu kiu disvolviĝas, vespere de Sankta Vendredo, en la etoso kiun kreas la mallarĝaj stratoj de Monako-Urbo, lumigitaj tiun tagon tiamaniere ke ili aspektas ankoraŭ pli mezepokaj.

De tiu Princlando, tiel bela kaj tiel diversaspekta, tiel fidele ligita al sia pasinteco kaj tamen rezolute turniĝanta al la estonteco, Marcel Pagnol skribis :

« Tie ĉi la artoj povas ankoraŭ vivi, sub la ombro de la olivarbo, sur la bordo de la latina maro, tie kie la aŭtoritateco de unu solulo gardas la liberecon de ĉiuj ».

Dum Paul Géraudy difinis ĝin per ĉi tiuj vortoj :

« Freŝaj ĝardenoj, bonodoraj aleoj, bluj terasoj, kie la realo estas nereala, kie la Desiĝoj estas interrompitaj kaj kie la Tempo ferias, sorĉa mondo, mirteatraĵo, retrovita Paradizo, ĝajganta revengo de la Feliĉo : MONAKO ».

Elfrancigis kelkaj membroj de la Monaka Grupo.



El ie en la Mondo

FANTAZIAĴOJ - EL LONDONO

Apombo estas aparta Londona talento. Sed ĉu vi aŭdis pri Ann Hicks kiu vivis en la unua duonparto de la antaŭa jarcento? Ŝi havis neŝirmitan budeton apud la orienta ekstremo de la lago Serpentine en Hyde Park. Ŝi skribis leteron al la taŭga instanco, t.e. la « Commissioner of Works and Forests », kaj petis permeson konstrui tie baraketon kun seruro, por konservi dumnokte siajn varojn. Oni permesis. Post iom da tempo, ŝi denove skribis leteron. Ŝi petis permeson konstrui brikan muron ĉirkaŭ sia budo. Oni permesis. Tiu muro, tamen, estis sufiĉe alta. Ĝi havis fenestrojn, kaj ankaŭ pordon. Tiam, ŝi denove verkis leteron. Ŝi petis permeson altigi la muron ĝis alteco de kvin futoj. Oni permesis. Ŝi, tiam, petis permeson pri tegmento. Oni permesis. Sed, samtempe, senpermeso ia ajn, aperis kamentuto. Nun, ŝi havis propran dometon en Hyde Park. Ŝi skribis denove por havi permeson konstrui barilon por, ke la knaboj ne plu venu por rigardi tra ŝia fenestro. Oni permesis. Ŝi konstruis barilon. Kaj, iom post iom, ŝi pli kaj pli forigis ĝin for de la dometo, ĝis ŝia regno estiĝis sufiĉe ampleksa. Finfine, pro la Granda Ekspozicio en Hyde Park dum la jaro 1852, oni ordonis al ŝi malokupi tiun terenon. Ŝi tuj komencis forte batali por siaj rajtoj. Ŝi diris, ke ŝia patro, iam, savis la vivon de la reĝo George la dua, kiu estis drononta en la Serpentine. La rajto havi budon estis — ŝi pretendis — rekompenco pro tiu ago. Sed legisto montris, ke tia rajto tute ne ekzistis. Tamen, oni donis al Ann Hicks malgrandan pension. Malgraŭ tio, ŝi daŭrigis la batalon. Ŝi metis afiŝojn sur la arbojn en la parko, kaj sufiĉe granda nombro da homoj komencis kredi, ke ŝi estas viktimo.

Sed, finfine, post demandoj kaj respondoj en la Parlamento, ŝi devis rezigni pri siaj pretendoj.

..

Alia sprita Londonino, vera « Cockney » estis Nell Gwynn, aktorino, pri kiu Pepys, en sia taglibro, laŭdas ankaŭ. Ŝi komencis malriĉa. Ŝi vendis oranĝojn ekster la teatro de Drury Lane. Estiginte aktorino, ŝi ankaŭ estis bona amikino de la reĝo Karlo la dua, kaj naskis al li kelkajn infanojn. Sed ŝi restis ĉiam simpla, bonkora, kaj tre amata de la ordinara popolo, kiu malamegis aliajn reĝajn amatinojn, precipe la Dukino de Portsmouth, francino, kiu, oni diris, estis vera spionino de la franca reĝo. Iam, dum kaleso de Nell Gwynn trairis Oksfordon, la homamaso kredis, ke estas tiu de la Dukino. Oni komencis insulti, blasfemi, minaci, eĉjeti ŝtonojn. Ĝis Nell Gwynn malfermis la fenestron, kaj klini-

ĝis el ĝi, kaj krlis: « Ne faru tiel, bonaj amikoj, estas mi, la protestanta putino! » Tiam, laŭte, oni akklamis ŝin.

LEGENDOJ EL BRITUJO

Pri kreado de Londono. — Londono estas pli aĝa ol Romo: sep jarojn pli aĝa, diras legendo. Iam, en la fama urbo de Trojo, loĝis imperiestro. Lia nomo estis Diokleciano. Lia edzino naskis al li tridek du filinojn. Siatempo, ili ĉiuj tridekdu edziniĝis... kaj poste ĉiuj tridekdu murdis siajn edzojn. Ilia, iom netolerema, patro furioziĝis pro tio. Malmolkore, li forpells ĉiujn tridekdu siajn filinojn ekster ilian hejmurbon. Kiel aliaj kompaktindaj forpeliĵoj dum la jarcentoj, ili serĉis rifugejon en insulo. Ĉi-tie, ili denove edziniĝis... sed kun diabloj! Ili naskis gigantojn. Poste, post milito inter la grekoj kaj la trojanoj, alvenis ĉi-tien aliaj rifugiĵoj el la malfeliĉa urbo Trojo. Ilia ĉefo estis Bruto, filo de Eneo. Li venkis la gigantojn, fondis la urbon Londono, kaj donis al la lando sian propran nomon: Brutujo, poste Britujo.


..

Eble vi ne kredas tion? Do, ni venu en la tempo pri kiu verkoj restas, kaj aŭskultu rakonton pri Londonano de la mezepoko. Li vivis dum la 12a. jarcento, kaj estis eminentulo ĉe la kortego de la reĝo Henriko la 1a. Lia nomo estis Rahere. Nu, kiel vi jam legis en libroj, tiu kortego, kiu estis iam gaja, subite estiĝis tre malgaja, ĉar la unika filo de la reĝo, dronis pro la pereco de la « Blanka Ŝipo ». Oni eĉ diras, ke la reĝo neniam poste ridetis. Bona kortegano devas imiti sian reĝon. Do ankoraŭ Rahere serioziĝis. Li fariĝis religiema, kaj li pilgrimis ĝis Romo. Nu, ĉirkaŭ Romo estis marĉaĵo kiu tiutempe naskis multajn febrojn. Forta febro atakis Rahere. Li kredis, ke li mortos. Kaj li juris, ke se li resaniĝos, kaj revidos Londonon, li konstruos hospitalon. Dum la nokto li sonĝis. Jen lia sonĝo: li vidis grandan drakon, kiu prenis lin per siaj ungegoj kaj portis lin aeren super nigrega puto vomanta putrecan fumon, kaj minacis tien jeti lin. Je tiu momento, aperis Sankta Bartolomeo. Li savis Rahere el la ungegoj de la drako, kaj Rahere demandis, kion li devos fari? La sanktulo ordonis, ke, kiam denove en Londono, tiam Rahere devos konstrui preĝejon. Tiel li faris. Kaj por la vero de la rakonto restas atestaĵoj: estas, en Londono, la preĝejo kaj la hospitalo Sankta Bartolomeo.


De S-ro FOWLER, el Londono.

Okcidento - Oriento


Aspektoj de Hindujo



Sur la vastega surfaco de Hindujo troviĝas la plej diversaj kaj pitoreskaj pejzaĝoj : montaroj, arbaroj, riveroj kaj riveregoj, kiel la Gango, kiu trafluas Benares, la sanktan urbon. Tra la jarcentoj pilgrimantoj el la tuta lando tien venis kaj stampis la urbon per sia scio kaj sia kredo. En neniu alia parto de Oriento tiom miksiĝis sorĉo kaj mistikismo de la pasinteco, kiom en la urbo de Ŝiva, respektigata dio.



Tiun gloran pasintecon esprimas Agra, kies unika mirindaĵo « Taj Mahal », maŭzoleo el blanka marmoro riĉigita per juvel-ŝtonoj, akceptas multegon da vizitantoj. Kvindek kilometrojn for de Agra situas, tute izolita, Fatehpur Sikri, ĉefurbo forlasita 60 jarojn post sia konstruo pro manko de akvo. Oni tie povas admiri la grandan pavimitan korton, kie la imperiestro ludis ŝakon uzante junajn sklavojn kiel peonojn, kaj la pordegon, unu el la plej belaj en la tuta mondo.



Tiun eternecon de Hindujo oni ankaŭ trovas en la multaj temploj renkontitaj tie kaj tie ĉi sur la vasta teritorio de Hindujo, postrestaĵoj de unu el la plej malnovaj civilizacioj en la mondo ĉar ĝi datigas de la fino de la kvara jarmilo antaŭ Kristo. Poste la kultura heredaĵo de Hindujo pliriĉiĝis per kontaktoj kun la Arianoj, la Egiptoj, la Romanoj kaj islamanoj. Intersanĝoj kun Okcidento nun ebligas la disvolvigon de modernaj sciencoj kaj teknikoj.

(Fotoj de la Nacia Turisma Oficejo de Hindujo).

S-ro Grabowski kaj Moŝta baronino

Roluloj : S-ro Grabowski - Moŝta baronino -
esperanta instruistino kaj tri ge-
lernantoj : Elsa, Maria, Ludoviko.

Elsa : Kia brilega festo ! ĉi tie ĉeestas ne malpli ol 100 personoj !

Maria : Ĉefe altranguloj, kaj kiom da riĉe, elegante vestitaj sinjorinoj !

Ludoviko : Ni dankas nian karan instruistinon enkonduki nin en tian solenan renkontiĝon.

Instruistino : Estas D-ro Zamenhof mem, kiu sendis al mi invitkarton por partopreni en la deka datreveno de la apero de la « Unua Libro ».

Elsa : Kiom da progresoj ekde tiu tempo !

Instruistino : Ho ! Jes vere. Vidu doktoron Zamenhof radias, sed li travivis terure malfacilajn tagojn.

Ludoviko : Mi ankoraŭ ne konas lin. Kie li sidas ?

Maria : Mi bone konas lin. Jam trifoje mi vizitis lian modestan atendejon pro miaj malsanaj okuloj. Dank'al li mi nun vidas perfekte : kaj aŭdu, kiam li eksciis ke mi estas simpla kudristino, li postulis nur kvardek centimojn. Kiel bonkora, modesta homo, malgranda viro sed grandanima !

Ludoviko : Do, bonvolu montri lin al mi.

Maria : Ho ! Li ĵus eliris tra tiu pordo kun la urbestro.

Instruistino : Diru ĉu iu el vi konas la iom fiercan sed tiel belan blondulinon, dekstramane ?

Elsa : Ŝi estas la germana Moŝta baronino Steinhober. Mi donis al ŝi lecionojn pri franca lingvo. Ŝi estas facilanima kaj ne tre inteligenta.

Maria : Ŝi nek pulvon nek alumetojn elpensis !

Instruistino : Ŝia eleganta kunparolanto, S-ro Grabowski, amiko de D-ro Zamenhof, scipovas dekdu lingvojn kaj ĉirkaŭ 30 li komprenas.

Ludoviko : Eminentaj geniulo !

Elsa : Ili alproksimiĝas kaj parolas tiel laŭte, ke ni komprenas ilin.

Baronino : S-ro Grabowski, ĉu vi ne opinias, ke tiu Esperanto estas nur lingvaĉo, abomeninda miksaĵo de rusaj, polaj, germanaj, francaj eĉ judaj vortoj ? Ĝi ne povas esti klara, bela, harmonia kaj muzikeca, kiel la itala lingvo. Kara S-ro Grabowski, vi kiu scipovas la italan lingvon, deklamu al ni poemeton en la lingvo de Dante.

Grabowski : Kun plezuro, moŝta baronino. Ĉu vi parolas aŭ komprenas ĝin ?

Baronino : Tute ne. Sed iam mi aŭdis belege paroli iun italan princon.

Grabowski : (kun emfazo) : La unua lernolibro... netuŝebla fundamento... eldonota vortaro... la tagiĝo, eta poemeto verkita de mi... Levigas la suno... subiras la suno, vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo.

Baronino : Mirinde bele. Oni tuj sentis, aŭdis la veran belecon, perfektecon de la plej muzika lingvo de l'mondo... la Itala.

Ludoviko : Li kruele mokas ŝin.

Baronino : Nun, S-ro Grabowski, diru al ni kelkajn frazojn el tiu nove elpensita, eĉ artefarita lingvo de tiu juda D-ro Zamenhof.

Grabowski : Volonte, moŝta baronino.

Baronino : Vi ĉiam plenumas miajn dezirojn.

Grabowski : Per me si va ne la citta dolente, per me si va ne l'eterno dolore, par me si va tra la perduta gente, giustizia mosse il mia alto fattore. Lasciate ogni speranza, voi ch' entrate...

Baronino : Terure teda, missonora, monotona. Oni tuj sentas artefaritan lingvon, sen vivo, sen varmeko, sen belo...

Grabowski : Mi bedaŭras, Moŝta baronino, sed vi tute eraris. Mi intence trompis vin. La unua teksto, kiun vi tiel laŭdis, admiris, estas Esperanto, kaj la duan, mi elprenis el la mondfama Infero de Dante.

Maria : Ho ! Ĉu vi vidis, kiel tio fermis al ŝi la bekon ?

Instruistino : Ni devos gratuli S-ron Grabowski. Kaj nun ni multe pli komprenas la mirindan belecon de nia Esperanto. Iru Kune.

Verkis Hélène CHAVAN.

GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 250 jaroj naskiĝis en Erasbach

Christophe Willibald GLUCK. — Tiu komponisto enkondukis renversegon en la muzik-historio. Post kompensado de konvenciaj, seriozaj kaj burleskaj operoj, Gluck sukcesis ŝanĝi la barokan operon. Li inspiriĝis per la greka mitologio kaj batalis kontraŭ la luksegaj ornamoj de la kanto. La arioj retrovis sian originan senceon prenante la karakteron de melodijaj kantoj. « Orphée » kaj « Alceste » estas du el la plej konataj komponaĵoj de Gluck.



Antaŭ 100 jaroj naskiĝis en Munkeno

Richard STRAUSS. — Nur 20 jara, tiu artisto eniris la muzikan vivon, kiel komponisto kaj orkestrestro. Li profesiis en Munkeno, Berlino, Vieno kaj fine en Garmisch kie li mortis. Strauss estris preskaŭ ĉiujn gravajn orkestrojn en Eŭropo kaj li vere estis impona rimarkindulo en la germana muzika vivo dum la dek lastaj jaroj de la XXa jarcento. Ni dankas al li operojn, balet-muzikon, simfoniojn kaj ĉambro-muzikon.



Antaŭ 70 jaroj naskiĝis en Oslo

Trygve GULBRANSEN. — Tiu rakontisto de la norvegaj arbaroj kaj montaroj devenis de kamparana familio. Li unue estis fabrik-direktoro, negocisto kaj sport-jurnalisto. Post la sukceso renkontita de liaj romanoj en Eŭropo li vivis apud Eidsberg. Liaj verkoj skribitaj per simpla, klara lingvo rakontas la vivon de la norvegaj kamparanoj. Liaj ĉefaj rakontoj estas : « Kaj eterne kantas la arbaroj » kaj « la Heredaĵo de Bjorntal ».

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Jen la rezultoj de nia konkurso 1963-64 :

1. S-ro R. RAYNAUD, **Alès** (Gard)
63 poentoj.
2. S-ino LENEL, **Hazebrouck** (Nord)
56 poentoj.
3. S-ino COMBEBIAS, **Dax** (Landes)
55 poentoj.
4. D-ro TORTEL, F.F.A.
51 poentoj.
5. F-ino CARRE, **Villefranche** (Rhône)
50 poentoj.
6. S-ro MAYNAR, **Zaragossa** (Hisp.)
48 poentoj.
7. S-ro SUCHAREAU, **Paris**
48 poentoj.
8. S-ro RINGOTTE, **Roubaix** (Nord)
47 poentoj.
9. S-ro LIGOT, **Valenciennes** (Nord)
42 poentoj.
10. S-ino VINCENT, **Les Andelys** (Eure)
35 poentoj.
k.t.p...

Pro eraro de la presisto, la lasta parto de nia konkurso estis iom fuŝita. Car la plimulto el la konkursintoj ne respondis tiun parton tiu eraro ne influis la rezulton.

Ni deziras, ke la 64-65a. konkurso estu pli interesa ol la pasintaj. Pro tio ni petas ĉiujn interesatojn, ke ili bonvolu sciigi, ĉu ili pli ŝatas nur gramatikajn temojn, aŭ miksitajn problemojn. Kompreneble ni ne povos kontentigi ĉiujn. Ni klopodos respondi la dezirojn de la plimulto. Ni atentigas vin ke vi devas respondi nur la problemojn (du ĉiufoje) de la konkurso, ne la amuzajn problemojn, kiuj estas apartaj de la konkurso. Nova konkurso komenciĝas en la 5-a numero (sept-oktobro) ĉiujare, kaj daŭras dum kvar numeroj.

Bonvolu sendi viajn respondojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la apero de la gazeto. Cion koncerne la konkurso vi devas sendi al :

S-ro CHEVALIER, 19, boulevard G. Lauriol, Nantes (L.-A.) France.

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvoj de la lastaj problemoj

La brigo : Povas malgajni unu, du aŭ tri ludantoj, kaj paralele povas gajni tri, du aŭ unu ludantoj.

Estu « x » la malgajno de la dua ludanto ; la malgajno de la unua estas « 2x » kaj post la ludo la unua posedas :

$$1.000 - 2x, \text{ kaj la dua } 400 - x$$

Ni do povas skribi :

$$1.000 - 2x = 3 (400 - x) = 1.200 - 3x$$

$$3x - 2x = 1.200 - 1.000; x = 200; 2x = 400$$

Respondo : la unua malgajnis 400 frankojn;
la dua malgajnis 200 frankojn.

Serpentmova proverbo :

Marto
Nimbo
Kalva
Panjo
Imuna
Kruro
Ikono
Ejgo
Nesto
Kesto
Gipso
Karoo
Pasiv
Talio

Testo
Emiro
Irizo
Anaso
Fluso
Falto
Lando
Paneo
Talpo
Eŝafod
Opalo
Aviso
Foino
Dresi

Frazo trovata : Mil jaroj ne povis, minuto elŝovis.

NOVAJ PROBLEMOJ

Sescifera nombro (S-ro Jarlier) :

Sescifera nombro komenciĝas per 1 maldekstre. Se oni transportas tiun ciferon de la maldekstro al la dekstro, la nombro ne ŝanĝiĝas. Kiu estas tiu nombro ?



« Eraroj trovataj »

Kiel ĉiujn matene la ĉareto de la lakto-ven-
disto skuade iras sur la pavimoj. Ĝi iras tiel mal-
rapide, ke vi certe havos tempon por trovi la ok
erarojn kiuj diferencigas unu ilustraĵon de la
alia.




GRAMATIKO

PER

BONHUMORO

« Ĉiu prepozicio, laŭ via logika esenco, povas esti uzata nur antaŭ substantivo. Sekve se antaŭ vorto, kiu havas verban sencon, ni deziras uzi prepozicion, ni devas doni al tiu verbosenca vorto la formon de substantivo; ekzemple anstataŭ « kun saluti », « sen respondi » ni devas diri « kun saluto », « sen respondo ». Se la vortoj « por » kaj « anstataŭ » estas uzataj kun la infinitivo, ili tute ne prezentas ian escepton, sed la kaŭzo de tia uzado estas alia, nome : la vortoj « por » kaj « anstataŭ » uzataj antaŭ infinitivo havas la sencon ne de pura prepozicio, sed preskaŭ de konjunkcio... ».

(L.L. ZAMENHOF. « Lingvaj Respondoj »)



— Anstataŭ frekventi la trinkejojn mia edzo preferas konstrui vivo-simpligilojn.



— Ĉu vi ne diris, ke vi ne povas ĝui feriojn sen matena bano?



— Se mi havus pluv ombrelon mi povus daŭre akvumi sen malsekiĝo de mia kapo.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).
- Ĉeĥoslovakio** : S-ro Valentin Kibalčíč, TICHY POTOK, p. Brezonica n/T.
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).
- Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).
- Germanujo (DDR)** : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).
- Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).
- Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO.
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).
- Svedujo** : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM SÖ, Postgiro : 157007 (6 kr.).
- Svilando** : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adresro).
- Usono** : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
- Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝango de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo